



# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

oktobro (1) - '92

Por scienca esploro

## 20 gravedaj esperantistinoj serĉataj

Pri ĉiuj grandaj naciaj lingvoj ekzistas plurvolumaj studoj pri la maniero, laŭ kiu infanoj denaske akiras tiujn lingvojn. Tiuj studoj, interalie, helpas lingvistojn kompreni multajn facetojn de la koncernaj lingvoj kaj de la evoluo de la parolkapablo de infanoj, kiuj parolas ilin. Tiuj studoj provizas bazon, ekzemple, por verki lernolibrojn pri la koncernaj lingvoj aŭ por pluaj studoj pri infanoj kun parol-problemoj, ktp.



Prezentiĝas nun la okazo realigi ion similan ankaŭ pri esperanto, ĉar mi mem povas utiligi la laborejon de la Universitato en Romo, en kiu oni okupiĝas pri ĝuste tiaj studoj.

Tiucele mi bezonas sekvi la lingvan evoluon de 20 infanoj, kiuj de la naskomomento estas alparolataj de almenaŭ unu gepatro en esperanto.

La familioj, kiuj partoprenos la eksperimenton, esence devos sekvi metodon evoluigitan en la roma universitato por kolekti informojn pri la lingva evoluo de la infano. Ne estos granda laboro kaj eĉ povos temi pri plaĉa flankokupo dum la unuaj vivo-jaroj de la bebo. Temos pri notado en taglibro de la plej interesaj esprimoj de la infano (en ĉiuj lingvoj, kiujn ĝi konas), pri kolektado de vortprovizaj listoj ĉiun trian monaton kaj pri surbendigado de la ludanta infano de tempo al tempo.

Kaj nun mi donu etan klarigon pri la iom ŝerca titolo.

La beboj prefere estu ankoraŭ naskotaj, por ke mi havu la tempon sendi la necesajn informojn al la gepatroj antaŭ la nasko. Tial mi serĉas nun gravedajn virinojn.

Tiuj virinoj povus esti esperantistinoj aŭ/kaj edzinoj de esperantistoj. En la dua kazo, kondiĉe ke la patro intencas regule alparoli la bebon en esperanto, mi estos tre kontenta rilati kun la familio kaj enlistigi la bebon inter la studentajn infanojn.

En la unua kazo (graveda esperantistino) mi estos ege pli kontenta, se la patrino mem volas paroli kun la bebo en esperanto, dum la patro parolas la lokan lingvon.

Fakte ekzistas relative multaj denaskaj parolantoj de esperanto. Laŭ mia takso en la nuna momento almenaŭ 200 familioj en la tuta mondo normale uzas esperanton. Tamen tre

ofte la portantoj de la internacia lingvo estas la patroj, dum la patrinoj parolas la lokan lingvon (ĝenerale tia estas la modelo en samnaciaj paroj) aŭ sian nacian lingvon (ĝenerale tio okazas



en malsamnaciaj paroj, en kiuj la fremda edzino loĝanta en la edzo-lando estas la nura ebla fonto por la neloka lingvo). Kvankam tio ne signifas, ke la infanoj ne parolos esperanton, aliflanke tio havas sekvojn ĉefe dum la unuaj evolu-jaroj.

Tio klarigas, kial mi aparte ĝojas pri la unua kazo, sed tute kontentas ankaŭ pri la dua.

Bonvolu kontakti min (*Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00036 Palestrina, Italujo, tel. +39-6-9575713*) kaj mi tuj reagos al vi, por ke mia letero atingu vin almenaŭ samtempe kun la akuŝistino.

*Renato Corsetti, Italio*

## Pli ol dek minutoj en la amaskomunikiloj!

Laŭ la iniciato de John Spencer kaj Alberto Menabene, la 10-an de aŭgusto okazis la ĉi-jara internacia esperanto ago-tago.

En Londono, Bruselo, Romo ĉ. po 20 esperantistoj, en Budapeŝto pli ol 90 homoj kuraĝis publike elmontri sian esperantistecon, kaj provi fari ion por la ekstera manifestiĝo de la movado. (Pri aliaj urboj kiel Kiev, Bukareŝt, Amsterdam ni scias nur pri la preparoj, sed ne pri la rezultoj).

En Budapeŝto la ago-tago okazis la unuan fojon, kio ja montriĝis ankaŭ en tio, ke plejmulto de esperantistoj, eĉ la t.n. "gvidantoj", estraranoj, malnovaj aktivuloj ne kuraĝis ĉeesti, kaj timante la fiaskon trovis iun pretekston por foresti.

Tamen, ĉ. 90 esperantistoj kaj manpleno da infanoj en 3 grupoj disdonadis pli ol 5000 informan broŝuron pri esperanto, kaj fine kolektiĝinte akceptis alvokon al 4 diversaj instancoj, postulante konkretajn agojn pri la Internacia Lingvo. (Radio: *ŝanĝon de frekvencoj de E-elsendoj al la mezonda kaj kurtonda bendoj kaj samkategorian financigon de e-elsendoj, kiel tiuj de aliaj*

*Ministerio pri Kulturaj Aferoj: samkategorian subtenon kaj financigon de e-instruado kaj instruiloj kiel por la aliaj lingvoj; Ministerio pri Eks-*



*terlandaj Aferoj (kaj Komisiono pri Eksterlandaj Aferoj de la Parlamento): iniciatu la pritrakton de*

*la internacia lingvo-komunikada problemo.*

Danke al la bona gazetara preparo, pri la agotago raportis la vespera novaĵprogramo de la televido, raportis pluraj radioprogramoj (iu raportisto eĉ intervjuis s-ro Menabene), kaj aperis longaj artikoloj en 3 tutlandaj kaj budapeŝtaj tagjurnaloj. Plej alloga por la journalistoj estis la fakto, ke la sama evento okazas en pluraj ĉefurboj!!!

La suma elsendo-tempo pri la esperanta ago-tago estis pli ol 10 minutoj en la centraj amaskomunikiloj! Se la hungaraj esperantistoj volus tion pagi kiel reklamo, apenaŭ sufiĉus la tuta havaĵo de ĉiuj 14 hungaraj e-societoj, asocioj!

Estis farita ankaŭ videofilmo (ĉ. 15 minutoj) pri la budapeŝta ago-tago, kiu spektiblos ekz. dum la sekvajara IJS.

Ni nur esperu, ke laŭ la ĉi-jara sukceso sekvajare ankaŭ la nunaj "mal-kuraĝuloj" pretos ĉeesti. Kaj tiuj ĉi sukcesoj - eble - kuraĝigos la esperantistojn ankaŭ en aliaj ĉefurboj...

*Szilvási László*

## Movada teorio

En la artikolo tiuĉita *Esperanto en enciklopedioj* (Esperantisto Slovaka, 1/92,p.15) estas uzata du fojojn la vorto "adepto" kun rilato al esperanto.

a/ "Ĝi havis jam 100 000 adeptojn"

b/ "la nombro de ĝiaj adeptoj atingis 20 milionojn"

Kion signifas la vorto "adepto" en tiuj kunteksto? Plena Ilustrita Vortaro (PIV) donas tri difinojn de "adepto".

1. Majstro en alkemio,
2. Persono iniciata en sekton aŭ doktrinon kaj konanta ĉiujn ties sekretojn;
3. (figure) Persono sin okupanta pri malfacila aŭ nekutima arto aŭ scienco.

Estas evidente, ke nur la tria, figura difino de "adepto" konvenas; adepto de esperanto estas simple persono, kiu okupas sin pri la malfacila (por kelkaj) kaj nekutima (por la mondo ĝenerale) lingvo esperanto. Ankoraŭ ne sufiĉas sci tiu, ĉar nenio estas dirita pri la kompetenco de tiuj adeptoj. Ĉu ĉiuj vere scias kaj uzas la lingvon? Kiom da tiuj adeptoj estas nur pasivaj simpatiantoj aŭ aprobantoj de esperanto, kiuj neniam lernis la lingvon? La demando estas grava, ĉar tro entuziasmaj propagandistoj havas la tendenceon ŝveligi la nombrojn de adeptoj sen posedo de iu ajn objektivaj statistikaj donitaĵoj. Eĉ post pli ol centjara ekzisto de la esperanto-komunumo, neniam estis entreprenita preciza popolnombro de ĉiuj verdstantoj en Esperantujo.

La plej granda tubero en la afero estas la klasifikado de adeptoj laŭ la vidpunktoj de lingvoscio kaj ideologia engaĝigo en la movado. Ekzameno de verkoj pritrakantaj la temon malkovras, ke ekzistas diversaj terminoj, kiuj ne estas sinonimaj. Ili estas la sekvaj:

### a/ Esperantisto.

La plej bone konata difino de "esperantisto" estas tiu de Zamenhof en la "Deklaracio de Bulonjo-ĉe Maro" de la jaro 1905. "Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga."

## Kiuj estas la "adeptoj" de esperanto?

### b/ Esperantano

"Esperantano" estas difinita en PIV kiel "neaktiva aprobanto de esperanto". Estas probable, ke granda proporcio de la adeptoj apartenas al tiu ĉi kategorio de apogantoj kaj amikoj de esperanto, kiuj ne nepre posedas la lingvon.

### c/ Esperantismo.

En 1909 Zamenhof uzis la malofitan terminon "esperantismo" en la sekva kunteksto.

"UEA unuigas do ne ĉiujn esperantistojn, sed ĉiujn esperantismojn, t.e. tiujn homojn, kiuj konsideras ne nur esperanton en ĝia ekstera lingva formo, sed ankaŭ ĝian internan ideon."

Per kreo de diferencigaj nomoj, Zamenhof estigis du kategoriojn: en la unua estas adeptoj de esperanto, kies celo estas utiligi ĝin nur kiel rimedon de interkomunikado; en la dua grupo troviĝas la uzantoj de esperanto, dezirantaj disvastigi la movadan ideologion.

### ĉ/ Esperantofono.

La pola sociologo Jerzy Leyk enkondukis la terminon "esperantofono" kaj modifis la difinon de "esperantisto".

1. Esperantofono estas persono, kiu sciopovas praktike utiligi esperanton, komunikante kun aliaj homoj. Kvankam la plejmulto da ili identiĝas kun la movado, tio ne estas regulo.

2. Esperantisto estas persono konscie subtenanta la pretendojn de la esperantomovado (t.e. disvastigon de esperanto aŭ aktive aŭ kiel pasiva membro de esperanto-organizaĵo). Subteno de la aspiroj de la movado, eĉ aktiva, ne postulas bonan lingvokonon. Tiel, esperantisto ne nepre devas esti esperantofono.

### d/ Esperantlingvulo, E-lingvano

Por tiuj, kiuj volas eviti la neologismon "esperantofono", estas eble uzi sinonime "esperantlingvulo" kaj "esperantlingvano".

Por prezenti honestajn taksojn de la nombro de la adeptoj de esperanto, estas necese apartigi la homojn, kiuj vere scias kaj uzas la lingvon disde la aliaj. La sola maniero

fari tion estas decidi pri la nivelo de lingvoscio, kiun devas atingi persono, kiu nomiĝas "parolanto de esperanto". Teorie oni povas fari tion per ekzamenoj, sed tio ne estas ebla nuntempe, ĉar nur tre malgranda nombro de uzantoj de esperanto jam akiris ekzamenatistilon aŭ diplomon. Frekventado de kursoj ne estas bona kriterio, ĉar ne ĉiu lernanto de la lingvo fariĝas lerninto. Sekve, la sola rimedo mondskaŭle aplikebla estas mezuro de la praktika uzo de la lingvo. La koncernaj personoj devas montri, ke ili havas la kapablon uzi esperanton parole kaj skribe kiel interkomunikan vehiklon en ĉiuj sferoj de la ordinara vivo. Alia maniero atingi la saman celon estas postuli de esperantlingvulo nivelo de lingvoscio, kiu estas la ekvivalento de la ĝenerala lingvokapablo de lernanto en la oka klaso de elementa lernejo.

Se oni utiligas la ĉi-suprajn manierojn por difini la minimume akcepteblan lingvonivelon de esperantlingvulo, tiam devas malaperi la fantaziaj trotaksoj de milionoj da adeptoj en la mondo. Eĉ 100 000 estas tro alta cifero.

Bernard Golden

El Esperantisto Slovaka, 3/92.

*Ne por komplikigi la aferon, sed por klare vidi ni aldonu, ke en la lastaj jaroj ni uzas ankaŭ aliajn difinojn:*

1. Esperanto-simpatianto estas persono, nur iomete aŭ tute ne parolanta la lingvon, kiu subtenas (pasive aŭ aktive) la ideon de la Internacia Lingvo kaj de la e-movado.

2. Esperanto-parolanto aŭ esperantulo estas persono, kiu studis la lingvon, kaj en iu grado sciopovas ĝin uzi por komunikado, sed ne aparte interesiĝas pri la historio, kulturo, interna ideo de la movado.

3. Esperantisto estas persono, kiu krom scii la lingvon, konas ankaŭ la kulturon, historion ktp. de la movado, kaj (konscie aŭ ne) sentas sin apartenanta al la internacia esperanto-komunumo. "Aktivaj esperantistoj" laŭ siaj povoj aŭ ebloj klopodas fari ion por vivteni la komunumon (flegado de la esperanta kulturo, funkciigo de diversaj movadaj organoj kaj ankaŭ plivastigo de la komunumo).

Szilvási László

## Eŭropa Esperanto-Kongreso: ĉu vere eŭropa e-kongreso?

Inter la 5a kaj 10a de junio 1992 en Verona (Italio) okazis la "Unua Eŭropa Esperanto Kongreso, EEU" kun partopreno de ĉ. 350 partoprenantoj.

En la kadro de EEK kunvenis la asembleoj de Itala Esperanto-Federacio (FEI) kaj de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE). Festparolis la prezidanto de UEA, prof-ro John Wells; pri la lingvo-politiko de Eŭropa Komunumo prelegis Ferruccio Pisoni. Okazis altnivela publika diskuto en itala kaj esperanto kun samtempa interpretado pri la komunika-

do en la unuiganta Eŭropo: inter la raportantoj troviĝis J.H. Erasmus (Nederlando), A. Chiti Batelli (Italio) kaj G. Maertens (Belgio).



Dum la kongresaj tagoj okazis ankaŭ kunveno de la Eŭropa Esperanto-Unio kaj pluraj fakkunvenoj, kiel tiuj de Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), itala sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Eŭropa Radikala Asocio (ERA) kaj aliaj.

La nocio "Eŭropa Esperanto-Kongreso" en la praktiko signifas iun kongreson, kie kunvenas la decidpovaj reprezentantoj de eŭropaj lesperanto-asocioj, institucioj.

Se en Verona okazis kunveno de membro-organizo de Eŭropa Esperanto Unio (kio fakte estas nur okcidenteŭropa (!) regiona organizo) oni devintus ĝin nomi ne EEK sed kongreso de EEU.

Malgraŭ tio, ke en Verona okazis fine kunveno de multaj aktivuloj, sed eĉ ne de decidpovaj reprezentantoj, ĝi estis subteninda iniciato. Sed prefere oni nomu ĝin sekvafoje konferenco, aŭ seminario por ne forzi la nomon "eŭropa kongreso" - eble iam ni vere havos ĝin...

L.S.

## Faka aplikado

### La realaj eventoj en la verdulaj partioj

*Mi petis la redaktoron de "Esperanto" (centra revuo de UEA) por korektado de la estrara raporto aperinta en la maja numero de "Esperanto", disdonita en Vieno. Kiel mi komencis diri dum la kunveno de la Komitato (sed prezidanto Wells interrompis min, dirante, ke mi parolas ekster la temo), je paĝo 88. estas peza misinformo, ĉar tie oni simple asertas, ke en kelkaj verdulaj partioj troviĝas simpatiantoj al esperanto.*

La situacio estas la jena:

- 1.) en novembro 1989, sub premo de kelkaj esperantistoj, membroj de la partio, la franca verdula partio "les Verts" aprobis dum sia kongreso en Marsejlo rezolucion favoran al la uzado de esperanto en la rilatoj kun la frataj partioj;
- 2.) sekve de tio, la itala verdula partio, dum sia kongreso en Castrocaro, aprobis unanime en novembro 1990, mian rezolucion, kiu devigas la estraron organizi debaton pri la eŭropa lingva problemo je alta politika nivelo;

- 3.) sekve de tio, sub premo de italoj, dum la VI-a internacia kongreso de la verdulaj partioj okazinta en Zuriko en junio 1991, esperanto estis uzata oficiale en samtempa traduko, aldone al la aliaj kutimaj lingvoj (unufoje en la historio de la politikaj kongresoj);
- 4.) samtempe okazis en Ternopol la kongreso de la verdula partio de Ukrainio, kiu, sub premo de la lokaj esperantistoj, aprobis rezolucion favoran al esperanto por apogi tiun de la francoj;
- 5.) en Zuriko, okaze de la citita internacia kongreso, esperantistoj francaj kaj italaj fondis "Verdula Esperanto-Asocio"-n, kun la celo kunordigi la agadon de la esperantokologiistoj, interne de la respektiva verdula partio, por ke la unuopaj partioj aprobu rezolucion favoran al esperanto kiel la franca kaj ukraina partioj;
- 6.) sekve de tio, sub premo de VEA, la verdula deputito Gianni Lanzinger prezentis al la itala ministro pri publika instruado parlamentan demandon pri la eŭropa lingva problemo, unufoje en la itala historio.

*Alberto Menabene, Romo, Italio*

### Mono-aŭtomato - kiu scipovas esperanton

Komence de majo 1992 mi vizitis Lisbonon (ĉefurbon de Portugalio). La lastan tagon mi intencis ŝanĝi iom da mono dum vespero, sed la bankoj jam estis fermitaj. Mi aŭtobusis al la aerodromo de Lisbono kaj tie trovis ŝanĝaŭtomaton, kiu ŝanĝas 13 valutojn (10 de Eŭropo kaj de Usono, Kanado kaj Japanio). Ĝi donas informojn en 10 lingvoj, i.a. ankaŭ en esperanto. Mi premis la butonon n-ro 6 por esperanto kaj sur la ekrano

#### BANCO TOTTA & ACORES AEROPORTO 1281

Trans.: 006515 Dato: 05-05-92 Horo: 20:12

Akceptita bileto:	1.000,00 ESP
Kurzo: 1,33	
Kontraŭvaloro:	1.320,00 PTE
Elspezita sumo:	1.320,00 PTE

\*\*\* Dankon pro via vizito \*\*\*

aperis: "Bonvolu enmeti banknoton kaj premi la butonon de la lando!" Do, mi enmetis hispanan banknoton de 1000 pesetoj kaj sur la ekrano mi legis: "Vi enmetis 1000 pesetojn kaj ricevas 1320 eskudojn."

La mono elvenis el la aŭtomato kaj kun ĝi kvitanco en esperanto (v. la kopion).

Ĉu vi scias pri aliaj bankoj kaj aerodromoj, kiuj jam uzas esperanton? Skribu al la redaktejo.

*Hans Jankowski*

*Laŭ Informilo de la germanlingva LEA, n-ro 33/1992.*

### Ŝakistoj en Verda Olimpiko!

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia, EŜLI ĉiun kvaran jaron organizas internacian konkurson, "Verdan Olimpikon" inter ŝakistoj. La lasta, 3-a Verda Olimpiko okazis en julio 1991 en u. Podebrady (ĈSFR). Partoprenis ĝin 72 ŝakistoj-esperantistoj el 10 landoj: Nederlando, Sovetunio, Germanio, Estonio, Litovio, Usono, Belgio, Pollando, Rumanio kaj Ĉeio-Slovakio. (Temas ne nur pri



amatoroj, sed ankaŭ pri kvalifikitaj ŝakistoj). Ŝakludis dek kvaropaj teamoj.

En Podebrady estis elektita nova estraro de EŜLI: prezidanto iĝis Dan Maxwell el Usono, kaj sekretario - la subskribinto.

La 4-a Verdan Olimpiko de ŝakistoj estos organizata far hungaroj en 1995. En 1993 en Rumanio okazos EŜLI-festivalo - monda ĉampioneco de unuopaj ludantoj.

Por ĉiuj viaj demandoj staras je via dispono la sekretario de EŜLI:

*Saulius Miliunas, Partizanu 154-1, 3041 KAUNAS, Litovio  
Litova Stelo 1/1992.*

## Esperantistaj entreprenuloj atentulo!


Komputila servo "Perpetuum mobile" de malgranda privata entrepreno decidis eldonadi bultenon kun adresoj kaj anoncoj de komercaj entreprenoj, kiujn gvidas (aŭ kie aktive kunlaboras) esperantistoj. La anoncojn oni sendu al la adreso:

*alja 2, RUS-334212, Jalta, Rusio.*

## ILERA por radioamatoroj

La siglo RAE signifas radioamatoro-esperantisto. En 1970 estis fondita ILERA - Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj, kiu en la lastaj jaroj estis unu el la plej aktive funkciaj e-fakorganizoj. Nuntempe al ĝi apartenas 450 radioamatoroj en ĉ. 30 landoj. Membro de ILERA povas esti ĉiu radioamatoro, kiu akceptas la statuton de la Ligo kaj povas uzi esperanton dum la kontaktoj. Estas plurfoje eldonita adresaro de la membroj, kun la aliĝa numero de la membroj.

La nuntempa estraro konsistas el prezidanto UW9YE (Rusio), vicprezidanto DJ4PG (Germanio), sekretario HA7PW (Hungario) kaj landaj reprezentantoj.



La Ligo eldonas informan bultenon, kiun ricevas ĉiu membro kvarfoje dum jaro. ILERA donas diplomon al iu ajn radioamatoro, kiu povas pruvi per QSL (konfirm)kartoj, ke faris kontakton kun 10, 25, 50, 100 ktp. membroj de la Ligo. Ĉiujare en la tria semajnofino de novembro okazas tradicia esperanto-konkurso en kurtondaj frekvencoj. Oni povas partopreni en RAE-retoj, kiuj konstante okazas ĉiun sabaton kaj dimanĉon je 20.30 UTC aŭ ĉiun dimanĉon kaj lundon je 12.30 UTC en la 20-metra bendo, aŭ ĉiun dimanĉon kaj lundon je 11.00 UTC en la 15-metra bendo. Estas ankaŭ aliaj e-retoj, sed malpli aktivaj.

RAE-frekvencoj estas jenaj: 3766 Khz (80 m), 7066 (40 m), 14266 (20 m), 21266 (15 m), 28766 (10 m).

Se vi ankoraŭ ne estas radioamatoro, serĉu konaton, kiu montros ĉi tiun agrablan hobion, aŭ venu al iu radioklubo. Baldaŭ vi mem povos paroli kun multaj RAE de diversaj landoj kaj tiamaniere akiros novajn amikojn. Se vi havas radioamatoran konaton, vi informu lin/sin pri la supraj ebloj.

Pri ĉiuj demandoj bonvolu skribi al Riĉardas Strolia, LY2BFN, landa reprezentanto de Litovio en ILERA, Litovio, 3035 Kaunas, a.d. 706. Tel. hejma: +7-0127-735661, ofica: +7-0127-796997, aŭ al

*Matusinka László, HA7PW,  
sekretario de ILERA,  
Győzelem u. 2, H-2730 Albertirsa, Hungario.  
laŭ Litova Stelo 1/1992.*

## Organizaj demandoj

### Pli malbona ol Anaso Dagobert!

Kiu? UEA! Por la tradukado de la ekskursoj dum la ĉijara UK UEA promesis al la tiacelaj kunlaborantoj rekompencan de 500 ATS por duontaga kaj 1000 ATS por tuta taga ekskurso. Je la fino de la kongreso, post kiam ĉiu laboro estis farita, UEA sciigis, ke ĝi ne povas elspezi tiom da mono por traduko kaj reduktis la rekompencan al 350/750 ATS.

La 500 resp. 1000 ATS vere estus akceptebla rekompenco por la farita servo. La ĉiĉeronoj de la urbo Vieno ankaŭ ne perlaboras multe pli ol tiu sumo. Ĉiuj tuj estus pretintaj fari tiun servon ankaŭ kontraŭ la pli malgranda sumo,



fakte ĝi ja estas por la bona afero esperanto. Sed pro la posta malaltigo de la rekompenco, kiu serioze traktita ja estas rompo de parola

kontrakto kaj sekve procese postulebla, restis amara postgusto.

Al la nepagataj kunlaborantoj de la Loka Asista Komitato, kiuj ja sufiĉe laboris antaŭ la kongreso kaj ankaŭ la tutaj tagojn dum la kongreso, UEA promesis du sandviĉojn kiel tagmanĝon ĉiutage. Tiu eĉ ne povas esti traktita kiel rekompenco sed kiel kontentigo de baza bezono. Post la unuaj tagoj UEA ĉesis tiun "servon" per la argumentado, ke la sandviĉoj estus "tro multekostaj".

Neniu kontestas la rajton de UEA akiri monon. La diversaj aktivaĵoj fakte estas financendaj. Ankaŭ neniu kontestas la rajton de UEA provi, ke multaj servoj estu farotaj malmultekoste ĝis senkoste far esperantistoj. Tiel oni ŝparas sufiĉe da mono. Sed estas kondiĉo, ke oni honeste diru tion antaŭe kaj ne atingi tiujn celojn per la supre priskribita perfida maniero de malaltigo de rekompencoj.

Sed ankaŭ evidentiĝis, ke tiu taktiko de UEA funkcias: dum la UK ne sukcesis kuniĝi la LAK-kunlaborantoj por kune postuli la du sandviĉojn de UEA...

Michael Martin  
Voko el Stirio, sep.192.

Pli ol trimil personoj... Kaj ĉio glate funkciis. Kaj iom ŝerce: la Loka Asista Komitato decidis inviti la sekvajn 10 UK al Vieno, ĉar nun ĉiuj jam havas praktikon, kiun ne utiligi estus domaĝe. Ĉu ne?

H.M.  
Aŭstria E-Revuo, 3/92.

## Glate funkcia kongreso!

"Ni dankas pro la varma akcepto en via urbo", diris John Wells, prezidanto de UEA, dum la oficiala akcepto en la urbdomo de Vieno. Estis varma UK, ne nur pro la temperaturoj.

3033 partoprenantoj el 69 landoj: jen la verŝajne plej ofte cititaj ciferoj por karakterizi tiun plej grandan UK-n de la postmilita tempo en la okcidenta mondo. Unu jaro de streĉa laboro, unu semajno de glate funkcia kongreso en la luksa kaj multekosta kongresejo "Aŭstria Centro".

Estis plimalpli antaŭ unu jaro kiam UEA (Universala Esperanto-Asocio) la unuan fojon oficiale komunikis al la aŭstria esperantistaro, ke la 77-a UK definitive okazos en Vieno kaj ne en Prago. Kiel ĝis tiam planite. Restis nur unu jaro por prepari ĉion. Unu jaro - ege malmulte da tempo.

Multaj pensis, ke ne plu eblos starigi bone funkcia kongreson. Kutime oni ja havas tri ĝis kvin jarojn da tempo por prepariĝi, kutime la enlandaj e-organizaĵoj mem petas gastigi la UK-n. Male estis la situacio en Aŭstrio. Kelkaj jam prognozis fiasketon. Denove male, iom aŭstriece, malgraŭ la cirkonstancoj fine rezultis partopreninda kongreso.

Sub la gvido de prof. Maitzen estiĝis LAK, Loka Asista Komitato, kiu montriĝis esti sufiĉe taŭga. Ankaŭ AEJ (Aŭstria Esperanto-Junularo) reprezentis en tiu LAK por prepari junularan programon. Eble historia okazaĵo estis la "Junulara Amasloĝejo dum la UK" (JAUK).

De longa tempo UEA ne plu aranĝis amasloĝejon dum la UK. Por tamen ebligi al junuloj sen multe da mono resti dum tiu UK-semajno en Vieno, AEJ transprenis la ne tre facilan taskon organizi la menciitan JAUK-n. Post monataŭra serĉado troveblis taŭga ejo en la viena paroĥejo Hütteldorf. 50 ĝis 80 lokoj por nia disono, por prezoj inter 150,- kaj 300,- ATS por la tuta semajno. En tiu junulejo vespere okazis junularaj programoj kiel internacia vespero, muziko, lumbildprelegoj ktp.

Niaj junaj kaj entuziasmaj amikoj el Valencia (gastiga urbo de la sekvontjara UK) transprenis la ideon de la porjunulara amasloĝejo. Jam nun ili cerbumas pri ejo kaj programo por la sekvontjara UK. Ni vidu ĉu AEJ lanĉis per la JAUK novan evoluon!

Iom bedaŭrinda fakto estis, ke ne multe da junaj aŭstroj, ke nur kelkaj AEJ-membroj uzis la ŝancon partopreni kaj kunkrei la UK-n en nia propra lando. Ĉu aŭstroj vere nek vojaĝemas, nek kongresemas, nek amuziĝemas internacie?

Helmut Brath  
Voko el Stirio sep/92.

## Esperanto aplikata

### Informserva Kompanio - per esperanto

La firmao TONGHE Informoserva Kompanio uzas esperanton kiel ĉeflaboran lingvon en siaj agadoj. (Kapitalo 250 mil USD, oficas 12 ĉefingeneroj, profesoroj kaj 35 teknikistoj). Kunlaborante kun la revuo *El Popola Ĉinio*, la firmao TONGHE establas Peresperantan Informocentron en Pekino.

TONGHE okupiĝas nun pri maklera, edukativa, vizita, informa, kaj vojaĝa servoj, kaj ĝi estas peranto en Ĉinio por serio de eksterlandaj kompanioj (Koreio, Japanio, Svislando, Hongkongo ktp.)

La firmao Tonghe deziras kunlabori kun esperantistoj. Ili esperas ricevi kunlaboremom, helpon kaj subtenon el Esperantujo. Ĝi planas nun:

1. Starigi mondvastan informoreton. Vi estas invitata iĝi kunlaboranto kun rekompenco!
2. Investi en Eŭropo kaj Azio por establi TONGHE Informoservan Oficejon. Viaj proponoj estas bonvenaj, kaj serioze esplorotaj.
3. Organizati ekspoziciojn de ĉinaj produktaj-objektoj en eksterĉinaj landoj. Ankaŭ vi povas kunlabori por realigi tiun ĉi projekton.

Bonvolu kontakti:

TONGHE Informoserva Kompanio,  
Chuzhou Lu 210 Hao, Jiaoyu Dasha,  
HEFEI CN-230 011 Ĉinio.  
Telefono kaj fakso: +86-551-250241.  
Ĉefdirektoro: Wang Zhenggui (sc. esploristo).  
Esperanto-konsilanto: WANG Xigen

## Kontaktoj serĉataj

Komerca kompanio "Espero" invitas sovietiajn kaj alilandajn partnerojn por kunlaboro pri establo de komunaj entreprenoj per laborlingvo esperanto por:

- » juvela produktado;
- » lignoprilaboro, inkluzive de la produktado de mebloj;
- » elminigo kaj refabrikado de nafto;
- » enkonduko de novaj medicinaj metodoj de diagnozado kaj kuraco;
- » enkonduko de novaj metodoj por instruado al la infanoj;
- » enkonduko de novaj agrokulturaj teknologioj;
- » produktado de materialoj por konstruado kaj konstrua aranĝo;
- » konstruado de loĝejoj kaj aliaj objektoj.

Nia adreso:

644010 Omsk, p.k.514, Rusio.

Universala Kongreso de UEA: 24-31. en julio 1993, Valencio, Hispanio.  
Internacia Junulara Semajno, IJS: 31/07-06/08, Velem (?), Hungario.  
Internacia Junulara Kongreso de TEJO, IJK: 07-14. en aŭgusto, Vraca, Bulgario.

## Seula UK en 1994, formale agnoskita de registaro

La petico por okazigi UK-on en Seulo en 1994 fare de la Korea Esperanto-Asocio estas oficiale akceptita de la korea registaro. La 15-an de majo la ministro pri kulturaj aferoj sendis respondon al KEA, en kiu li oficiale infor-

mas pri la formala agnosko de la okazigo de Seula UK en 1994. La registara agnosko estas signifoplena pro la fakto, ke la registaro akceptas la Seulan Universalan Kongreson kiel oficialan eventon, kiun multflanke subtenas la registaro.

El La Espero el Koreio, majoljunio, 1992.

Klubo de batalaj amoj "Sakura" serĉas samideanojn pri profundigo de scioj pri "NIN DZJU CU" por interŝanĝi informojn kaj starigo de amikaj kontaktoj kun parencaj kluboj (organizaĵoj) kaj entuziasmaj unuopuloj.

Kontaktadreso:

Karasik Je.Ju., str. Ĉajkovskogo, N 7, kv.30,  
UKR-310024 FLARKOV-24, Ukrainio.

# UEA: Ĉu ne kapabla?

Instigis min verki tiun ĉi artikolon ne nur tio, pri kio homoj plendas ne oficiale, sed ankaŭ la konvinko, ke necesas komenci movadon celanta renovigon, efikigon de agado kaj ĝenerale plibonigon de UEA, organizaĵo kun grandega kaj ne utiligita potencialo. Estas nia, de UEA-membroj, morala devo ne nur pensi sed ankaŭ labori por tiu celo. Mi forte emfazu, ke kvankam tiu artikolo ŝajnas esti kritiko, ĝi celas ne nur tion. Precipa celo estis pensiigi geesperantistojn pri la reala situacio de UEA.

## Ĉu vivi surbaze de mondonacoj?

Unue pri plej serioza problemo de UEA - mono. Ni scias, ke de kelkaj jaroj la asocio havas deficiton en la buĝeto. Ŝajnas, ke nur danke al grandaj (precipe testamentaj) mondonacoj la organizaĵo havas sufiĉe grandan kapitalon, kiu certigas ĝian ekziston. Mi demandas min, ĉu UEA ankoraŭ ekzistus, se ĝi estus neniam ricevinta mondonacojn?

Laŭ financaj leĝoj organizaĵo kun buĝeta deficiito, ne nur ne povas evolui kaj agi efike, sed ankaŭ frontas danĝeron de pli aŭ malpli frua ekzistofino.

## Kion fari kun 10 milionoj?

Kion UEA povus fari, se ĝi ĉiujare gajnus 10 milionojn da guldenoj? Ja estas eble funkciigi ankaŭ entreprenon(j)n, kiuj povas tiun monon produkti por la funkciigo de la asocio. Certe oni konsentas, ke 10 milionoj da guldenoj estas mono, per kiu organizaĵo povas konkrete agi eĉ sen rezolucioj. Mi demandas min, ĉu anstataŭ iom hontiga kaj senteble malkontentiga decido, altigi membrajn kaj kongresajn kotizojn, ne estus pli saĝe kaj profitige fondi entreprenon? En la regaj instancoj de UEA mankas emo kompreni, ke sen grandaj monprofitoj la asocio ĉiam estos preskaŭ sensignifa, revanta forto en tiu materia mondo, kun regorganoj kiuj rekompencos sian financan malkapablon per mondonacoj kaj altigoj de ĉiuj eblaj kotizoj.

Tion, ke UEA ne sufiĉe evoluas, ni ĉiuj scias klare, ĉar ja estas neniu konkreta agado evoluiganta la movadon. UEA plenumas rolon de preskaŭ nur prestiĝa nomo, ne kapabla sukcese funkciigi projektojn pri evoluigo de la movado. (Mi persone, kiu dum tri jaroj kaj duono laboris plenatempe por evoluigo de la movado en Aziaj landoj, devis fini ĉion pro malemo de la estraro, finance kontribui al bonaj, la movadon evoluigaj projektoj.) Instrua estu ekzemplo de la membrovarba kampanjo (ĉu vi memoras ĝian celon pri la nombro?), kiu ja rezultis, sed mizere. Pli serioza, ne tiom rutina pritrakto de la projekto povus rezulti per almenaŭ duobligo de la membraro dum unu jaro. Sufiĉas dediĉi iom da tempo por analizo de sistemoj uzataj de similaj internaciaj organizaĵoj. Kion ili faras, por varbi membrojn kaj teni ilin?

## Regionajn filiojn al UEA!

Mi kunlaboris kun pluraj internaciaj organizaĵoj, kiuj havas branĉojn en dekoj da landoj, kaj tie oni ĉiam miris, kiam mi diris, ke UEA havas nur sian centran oficejon, kaj neniujn branĉajn oficejojn en aliaj landoj (ne menciante tiun en Novjorko). "Ĉu internacia organizaĵo povas efike agi, estante internacia nur pro sia membraro?" Mi ĉiam honte evitis respondi tiun demandon. Do, kial UEA ne havas branĉojn en dekoj da landoj? Ĉu rezultigas tion malemo perdi regopovon el Roterdamo aŭ simpla organiza malkapablo?

"Esperanto" - la monata eldonaĵo de UEA. Mi kredas, ke se redaktistoj de la revuo havus pli da sencenzura libereco kaj financo, ili evoluigus ĝin al pli valora, almenaŭ 100-paĝa plene kolora monata eldonaĵo, kiu havus dekojn aŭ centojn da miloj da abonantoj! Kial ja revuo ne havas pagatajn korespondantojn kaj ĵurnalistojn, se eĉ simplaj privataj gazetoj havas?

Iam, kiam mi estis naiva esperantisto, kredanta je preskaŭ dia poveco de UEA, ties estrarano diris al mi ion, kio ŝokis min: "oni havas impreson, ke en la CO iuj oficistoj estas eĉ kontraŭ agado por evoluigo de la movado, ĉar tio signifas por ili pli da laboro, kaj

ili jam estas tro ŝarĝitaj". "Do, UEA estas kontraŭ diskonigo de esperanto en la mondo?" - mi demandis min ne povante kredi tion. Nun mi komprenas, ke ne la oficistoj kulpis, sed la organiza flanko de la organizaĵo mem.

Multaj movadanoj, kiuj iam proponis bonajn, realigendajn (kaj nerealegeblajn) projektojn al UEA, scias, ke tio estis vana provo, kaj miris, kial la estraro ne akceptis la projektojn, eĉ ne profunde konsideras ilin. Plej ofte tiuj projektoj postulis financan apogon de UEA, kaj ja tiu ne kapablas financi eĉ sin mem. Tia konduto de UEA ja instigas homon aŭ al rezigno pri la movado aŭ al propra iniciatemo, sed tio konfirmas nin ke la regorganoj tro timas riski aŭ estas organize malkapablaj.

## Proporcian ŝarĝoportadon!

Mi jam menciis pri la kotizoj. Por persono el unuamonda lando pagi 36 guldenojn jare estas ne rimarkinda mono, sed por dua- aŭ tria-mondano pagi 20 guldenojn, ne malofte signifas redoni sian tutan salajron; do, por iuj la membreco kostas preskaŭ neniom kaj por aliuloj ĝi estas tro kosta. Kiu vere zorgas pri tio en UEA? Kiu almenaŭ klopodas kompreni tiun problemon? Iom da laboremo kaj simplaj esploroj pri salajroj en diversaj landoj de la mondo, pri printebloj de UEA-eldonaĵoj en aliaj landoj, kaj iom da entreprenemo povus tute solvi la malsanan kotizan sistemon.

## UEA ja estas ni!

Mi povus plilistigi la malfortajn flankojn de UEA, sed tio ne havus sencon, se ni ne celus forigon de ili. Iam Ivo Lapenna reformis agadon de la asocio, nun estas veninta sekva bezono por tio. UEA movade ne sufiĉe progresas pro siaj multaj organizaj mankoj. UEA povus esti bonege prosperanta asocio, aktive evoluiganta la movadon en la mondo. Ĉu ĝi estos tia, dependas de ni, ĉiuj ĝiaj membroj, ja UEA estas ni! Se ni ne kunlaboros celante reformi la asocion, ĝi daŭre vegetos revante pri signifa rolo en tiu mondo.

Mi listigu nur kelkajn, plej urĝajn aferojn reformendajn en la asocio, kaj mi petas vin, skribu pri tio, kion vi opinias, kion oni devas ŝanĝi, bonigi, novigi, reformi, forigi, enkonduki...

1. Financa politiko (plej granda temo, plej multaj ligitaj aferoj)
  - a/ kapitalo, fondaĵoj (utiligi profitige)
  - b/ financa statuto (mone profitiga aŭ neprofitiga entreprenon)
2. Kotizoj (pli bona sistemo)
3. "Esperanto", "Jarlibro" (aspekto, utilo, sencenzureco, ĵurnalistoj)
4. Membraro (nombro, servoj)
5. Delegita reto (ĝia utiligo)
6. Branĉoj (UEA-centroj en la mondo)
7. Agado celanta evoluigon de la movado kaj diskonigon de esperanto
8. Subteno de projektoj
9. Korespondado (CO ne respondas leterojn)

Mi planas fondi Asocion pro Progresigo de UEA (APUEA). Celo de la asocio estas nun klara al vi. Se vi sentas moralan respondecon pri sorto de UEA, bonvolu pensi iom, kaj skribu al mi, al esperantaj gazetoj. Valoras pensi pri detaloj. Montru problemon kaj proponu solvojn por ĝi. Ju pli da konkretaj proponoj, des pli da ebloj solvi problemon. Se ni kunlaboros en spirito de komprenemo kaj bezono helpi, ni sukcesos.

Ĉu vi estas estrarano, CO-oficisto, delegito, prezidanto, instruisto, movadano aŭ simpla esperantisto - reagu. Reagu ne nur per kritiko al UEA, mi aŭ iu/io alia, klopodante pravigi vian opinion (kvankam ankaŭ tion ni bezonas), **sed ankaŭ proponu ion, kio estos valora por UEA, kaj tio valoros por ni.**

Joachim Werdin  
pk. 147, PL 47-220 Kedzierzyn, Polio

*La supra artikolo estas la privata opinio de J. Werdin. Ni atendas la reagon kaj de la legantoj, kaj de la UEA-estraro. La red.*

## La kreado de originala frazeologio en esperanto

Kiu multe verkas en esperanto, precipe sur la tereno de beletro, forte sentas la bezonon posedi riĉan originalan frazeologion en la lingvo. Laŭ mia scio, neniu ĝis nun faris provon kolekti esprimojn jam uzitajn de aŭtoroj de noveloj, romanoj kaj teatraĵoj, por libroforma publikigo kiel originala frazeologio esperanta simila al la Proverbaro Esperanta de d-ro Zamenhof. Mi insiste ripetas, ke la kompilonto devas okupiĝi pri la originalaĵoj en esperanto kaj ne pri tradukoj de alilingvaj esprimoj. Ekde la tempo, kiam mi komencis verki originale en esperanto, mi konstatis, ke valora ekzerco por krea menso estas la elpensado de novaj frazeologiaj esprimoj por *eviti la verŝadon de malnova vino en novajn verdajn botelojn*. Estas emfazende ankaŭ, ke la diraĵoj kaj proverboj nepre aperu en kuntekstoj, t.e. en iu verko. Mi deziras prezenti en tiu ĉi eseo kelkajn ekzemplojn de originalaj frazeologiaj esprimoj por ilustrati la procedon, kun la espero, ke verkemuloj en Esperantujo estos kuraĝigitaj pliriĉigi ne nur sian stilon, sed samtempe ankaŭ la lingvon. Ĝuste tiaj trafaj, sukplenaĵoj povas altiri la atenton de aliaj aŭtoroj, kiuj alproprigos ilin por uzi en la propraj verkoj.

Unu el la procedoj konsistas en la reverkado de tradiciaj esperantaj proverboj kiel tiuj registritaj en Proverbaro Esperanta, kiujn d-ro Zamenhof tradukis surbaze de la kvarlingva frazeologio kompilita de lia patro. Jen kiel Zamenhof tradukis unu el ili: *pro multo da arboj li arbaron ne vidas*. Oni povas resti en la natura ĉirkaŭmedio sed iom variigi la pejzaĝon por emfazi alian nuancon: *pro multo da montoj li horizonton ne vidas*. Tiu ĉi versio reliefigas la figuran sencan de "horizonto" kaj tiel estas aplikebla al homoj mallarĝhorizontaj, t.e. mallarĝvidaj. Ankoraŭ apud la montoj kaj horizonto, oni povas uzi ilin por esprimi sintenon kontraŭan al tiu, kiun aludas la ĉi-supra ekzemplo: *rigardi trans montoj kaj horizonto*. Ĝi priskribas homon, kiu strebas pli foren, por atingi aferojn prezentantaj pli vastajn perspektivojn.

Kiel praktikan ilustraĵon de la uzo de originalaj frazeologiaj esprimoj, mi verkis imagitan konversacion inter du esperantistoj, s-ro Superesper, kiu estas defendanto de la klasika esperanto, kaj f-ino Verdperd, mallarĝhorizonta reformemulo.

**SUPERESPER:** Ĉu mi jam klarigis al vi mian ingenian manieron okupiĝi pri homoj, kiuj daŭre elcerbigas novajn proponojn kun la celo revizii nian lingvon? Pro ilia persistemo kaj fanatikeco, ne efikas fronta atakado kontraŭ ili. Oni devas batali malantaŭ iliaj linioj, sur la propra teritorio, kaj per la propraj armiloj.

**VERDPERD:** Mi ne povas imagi, kiel vi sukcesas fari tion. Vi ja scias, ke estas dirite, ke *kie anĝeloj ja timas paŝadi, tien stultuloj aŭdacas impeti*.

**SUPERESPER:** Vi pravas kiel pulvo, fraŭlino Verdperd, sed mi adoptas strategion uzatan de la plej fifamaj demagogoj, por ke mi povu silentigi la reformemulojn per subfosado de iliaj projektoj. Mia devizo estas: *se oni ne povas batali kontraŭ ili, oni aliĝu al ili*.

**VERDPERD:** (kunfrapante la manojn pro ĝojo) Ho ha! Do vi estas ĉe nia flanko. Vi mem fariĝos reformanto de esperanto.

**SUPERESPER:** Tute nel! Mi proponas al la reformprojektantoj mian "helpon" por modifi esperanton, kaj tiucele mi prezentas tiom da bizaraj, fantaziaj sugestoj, ke ilia lingvo estos ne simple reformita sed transformita ĝis nereconebleco. Tiel la klasika esperanto estos savita. *El la polvo venas la solvo*. Unu post la alia la reformemuloj kaj iliaj projektoj malaperos en la abismon de forgeso, kaj mi povos fanfarone proklami: *jen ŝakmat' per unu bat'!*

**VERDPERD:** Vi, hipokritulo! Vi agas nehoneŝte, eĉ neetike, kontraŭ reformemuloj.

**SUPERESPER:** Kara fraŭlino Verdperd, ĉu vi ne konas la saĝan eldiron, ke *en la amo kaj milito taŭgas ĉiu artifiko?*

**VERDPERD:** Ba! *Febia preteksto per klasika tekstol*

**SUPERESPER:** (replikante kun rideto) Ĉu vi ne scias, ke ankaŭ la *diablo kun talent' povas citi el la Fundament'?*

**VERDPERD:** (kolerante) Mi ne toleras vian mistraktadon de aliaj personoj. Kiel estas dirite, *la homo ne estas legomo*.

**SUPERESPER:** Tamen, en tiu ĉi situacio, vi ne rajtas diri, ke *ĉiu pugo du sidvangojn posedas*. Nur la veraj esperantistoj pravas.

**VERDPERD:** (preskaŭ venkinte) Nu, ne ŝanĝu la temon kaj pritraktu alian aferon. Mi deziras scii, kion vi opinias pri la Kontraŭakademio.

**SUPERESPER:** Kontraŭakademio?! Kio je la barbo de Bofronto estas la Kontraŭakademio?

**VERDPERD:** En 1990 cirkulero estis sendita al esperantistoj, en kiu estas propono fondi Kontraŭakademion por fari grandajn ŝanĝojn en la lingvo. Oni volas kunligi parolantojn de la "normala" esperanto, produkti "purigitan" version de PIV kaj produkti novan plenan gramatikon.

**SUPERESPER:** (montrante scivolon) Kiu estas tiu "oni"? Kiu proponis tiun idiotajn?

**VERDPERD:** Virino, kiu nun loĝas en Italio, Anna Löwenstein, kiu antaŭe nomiĝis Anna Brennan.

**SUPERESPER:** (furioziĝante) Ho ve! Ankoraŭfoje *jupo en la supo!*

**VERDPERD:** Nu, por paroli sincere, mi opinias, ke ŝiaj argumentoj havas iom da senco...

**SUPERESPER:** (interrompante la vortojn de f-ino Verdperd) Senco..... ŝmenco! Ĉu ankaŭ al vi okazis *krak' en la kap'?* La propono de tiu ino estas ankoraŭ unu ondero de la maro da reformoj, kiuj inundas Esperantujo nuntempe. Ni devas *unge kaj pugne* elradikigi tiun femalan frenezaĵon. *Kiu pri kretenaĵo silentas, kretenaĵon konsentas*.

**VERDPERD:** Ne estu tiel severa kontraŭ tiu virino, sinjoro Superesper. Povas esti, ke ŝi estas tute sincera sed nur fuŝe agis.

**SUPERESPER:** Jes ja! Mi konas tiujn denaskajn reformistojn. Ĉe ili *la fuŝo okazis dum l'akuŝo*. Kaj nun eĉ vi apogas la faraĉon de tiu ineksa misulo. Ĉu vi ne scias, kion oni diras franc-lingve, kiam okazas granda konfuzo kaj kaoso? *Cherchez la femme!*

**VERDPERD:** Mi ne komprenas tiun esprimon. Vi ne rajtas uzi fremdajn vortojn en esperanta konversacio. La verda lingvopapo jam *anaterne kaj vomeme* prononcis kondamnon kontraŭ tiu kutimo de lingvaj snoboj.

**SUPERESPER:** Do, estas eble esperantigi ĝin jene: *serĉu la virinon!*

**VERDPERD:** *Fetor' de mefit'!* Ĝi ja odoras je traduko kaj, cetere, ne havas sencan en esperanto.

**SUPERESPER:** Nu, lastatempe mi elpensis esperantan version: *kie brulas kaĉo, kulpas inaĉo!*

**VERDPERD:** (kapitulacante) *Pafe kaj trafe dirite!* Mi vidas, ke ĉe vi *sub la peruk' ne troviĝas nur veruk'.*

Estas eble daŭrigi la dialogon, sed trouzado de frazeologiaj esprimoj en unu teksto povas havi cerbtorporigan efikon. Ĉiokaze, mi volis montri la vojon al originala kreado kun la espero, ke inter la legantoj de tiu ĉi artikolo estas lingve kapablaj homoj, kiuj ricevos inspiron forĝi siajn proprajn frazeologiajn esprimojn kaj uzi ilin en diversgenraj kuntekstoj. La esperanto-movado mem povas kontribui multajn temojn, ĉar oni ne forgesu, ke *ne ĉio estas en ordo malantaŭ la verda pordo*.


## Aranĝoj

La plej granda junulara aranĝo!

### Internacia Seminario, la 36-a IS

27.12.92.-02.01.93, Bad Kleinen, Germanio.

IS en Germanio en la lastaj jaroj iĝis la plej populara, kaj unu el la plej bonaj junularaj renkontiĝoj. Ĉirkaŭ 400 partoprenantoj el 25-30 landoj faras veran internacia etoson, kaj ĝuas la amuzan, distran junularan etoson.



La ĉi-jara ĉeftemo estas: Lernado kaj edukado - taskoj por la 90-aj jaroj.

Dum la semajno oni havos apartan (publikan) komputilejon, pli ol 100 programerojn, esperantan rokmuzikon, - kaj kompreneble la silvestran balon.

Kotizoj inter 180 kaj 360 DEM, por memzorgantoj inter 90-150 DEM. Ekssoĉlandanoj ĝuos rabaton de 40 DEM!

Aliĝilojn, kaj pliajn informojn petu ĉe:

Germana E-Junularo, Berlina Oficejo, DO-1086 Berlin, Under den Linden 36-38.

La partoprenon en IS ni rekomendas al ĉiuj gejunuloj, parolantaj esperante. Hungaraj gejunuloj por eventuala subvencio turnu sin al HEJ:

Deák Mária, Észak u. 65,  
H-6800 Hódmezővásárhely, Hungario.



### TEJO/KER seminario en Torino!

Partopreni la seminariojn de la Komisiono de Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO ĉiam estas interese. Ĝi estas bonega okazo por ekkoni la aktivajn homojn agadantaj en TEJO, kaj estas memorinda la kune pasigitaj paroloj, diskutoj, kaj la vesperaj amuzoj...

La ĉi-jara seminario okazos inter la 30-a de oktobro kaj la 4a de novembro en Torino kun la ĉeftemo: "Kio preter ekonomio - eblaj alternativaj dimensioj en homaj rilatoj".

La partoprenkotozo (danke al subteno de la Eŭropa Junulara Fondaĵo) estas nur 120 NLG, kaj la partoprenantoj ricevos repagon de 50 % de siaj vojaĝkostoj.

Ĉu vi jam foje partoprenis TEJO/KER seminarion? Se ne, kial ne nun? Skribu, telefonu aŭ faksu rapide por pliaj informoj al:

Itala Esperanto-Junularo, Francesco Amerio,  
via Pagliani 5, I-10126 Torino, Italio.

Telefono: +39-11-676740,  
telefakso: +39-11-3190271.

### Novembra JES-Renkontiĝo

La Chaux-de-Fonds  
7-8-ajn de novembro 1992

Dum la semajnfino okazos ĝenerala asembleo, elekto de nova komitato, planado de la sekvontjara agado; krome ludoj, ekskursoj, libroaĉetado, ktp. Aliĝilon sendu al:

Junularo Esperantista Svislanda, JES,  
Pf. 779. 2301 La Chaux-de-Fonds.

### ILEI-membroj atentu!

## Seminario por instruistoj

06-09. de novembro, Poprad, Slovakio

ILEI organizas intensan tri-tagan kurson por instruistoj/instruantoj de esperanto pri la situaci-komunika maniero de instruado surbaze de la nova lernolibro-serio: Tendaraĵo Tagoj.

Dum la seminario oni traktos metodologion, principojn, teknikojn de la komunika instruado, kaj ekzercos ilin en etaj grupoj.

Estos dediĉita aparta sesio al principaj demandoj: celo de la instruado (ĉu sen aŭ kun movadaj informoj), kiel prezenti, instrui la vivon, la komunumon kaj la servojn.

Pliajn detalojn vidu en la numero aŭgusto-(2)-92. de EVENTOJ, kaj en IPR 92/2.



Eblas aliĝi ankaŭ surloke en Poprad!

### 49-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO IJK '93 en Vraca, Bulgario

la 7-an-14-an de aŭgusto 1993

### IJK en Orienta Eŭropo!

La kongresa temo, *Ekonomio kaj socio en ŝanĝiĝo*, certe interesos plimulton de la kongresanoj. Iuj, precipe el orienteŭropaj landoj, volas ekscii pli multe pri la monda merkato. Aliaj, el evoluintaj landoj, scivolos pri la ekonomiaj kaj sociaj ŝanĝoj en la eksaj socialismaj landoj, kia estas Bulgario.

Dum la kongresa semajno abundos kultura, distra, prelega, ekskursiva, sporta programoj. Venos interesaj homoj. Vi ĝuos amikan etoson!

**Venu al Vraca,  
vi ne bedaŭros!**

Bulgario varme akceptos vin!

La unuaj kvin aliĝintoj de 49-a IJK, kiuj samtempe aliĝis ankaŭ al la Internacia Junulara Semajno, IJS en Hungario, ricevos senpagan abonon al

la gazeto "EVENTOJ" por la jaro 1993!

Aliĝilon petu de:

Loka Kongresa Komitato de IJK:  
pk. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario.



La dua disSeminario de IEJ okazos inter la 30a de oktobro kaj la 1a de novembro (tuj-tuj antaŭ la TEJO-KER seminario) en Torino por novaj aktivuloj. Kotizo: 75.000 liroj. Ĉu partopreni? Kial ne? Kontakto:

Francesco Amerio,  
via Pagliani 15, I-10126 Torino  
Telefono: +36-11-676740

### 4-a Norda Esperanto-Rendevuo

okazos la 7-an kaj 8-an de novembro 1992. Loko: Base-de Plein-air Nature Morbecque-Le-Parc, F-59190 Hazebrouck, tel.: +33-28-436722. Organizantoj: Literatura Foiro, Societo Y.Martinot - sub aŭspicio de Nordfranca Esperanto-Federacio.

Dum du tagoj oni babiligos, amuziĝos, promenos, aŭskultos, ludos eĉ muzikumos!... Estos specialaj kursoj diversgradaj. Rapide informiĝu pri detale ĉe:

S-ro Jean Dietrich, 104 rue Jean Jaurès, F-59192  
Beuvrages, Francio. Tel.: +33-27-33-79-31.



Minoritatoj en Nordio  
Lingva Seminario

30/10-2/11 1992, Kungälv

Ĉu vi jam aliĝis?

Pliajn detalojn vidu en la numero aŭgusto-(1)-92.



### PSEK 20-jariĝis

Pola Studenta Esperanto-Komitato (PSEK), kiu grave rolis en la komenco de la okdekaj jaroj ĉe la elformiĝo de raŭmismo, fatis sian 20-jariĝon kadre de sia 14-a Somera Studenta Esperanto-Renkonto, okazinta en aŭgusto en Gdansk.

Kvankam estis aparte invitataj ĉ. 100 iamaj gvidantoj kaj aktivuloj, plejmulto povis ĉeesti nur anime. La foto montras parton de la 30 polaj kaj 15 eksterlandaj partoprenantoj sur belvida turo en Gdansk-Oliwa.

Ulrich Matthias, Germanio

## Movado

### Kion fari por eniri fakmedion?

ĉu preĝi? ĉu teorii? ĉu agadi? ĉu ...?

#### Konstato

1. Sen aplikado ankaŭ por fakceloj, e-o ne niam amase allogos, ĉar ne estos forta motiviĝo por lerni ĝin;

2. La plimulto el niaj fakaj "asocioj" estas nur surpaperaĵoj, kies agado estas tro ofte sen-signifa;

3. Grava eraro estus daŭre agadi nur en la internaj rondoj sen iu ajn kontakto al ne-esperantistaj samfakuloj.

#### Kion do ni devas fari?

1. Daŭrigi la ĝisnunan agadon, sed laŭeble plivigligi ĝin.

2. Starigi kontaktojn kun samfakuloj per

- tradukado de fakaj artikoloj el e-o por proponi al ne-esp-istaj fakbultenoj, revuoj;
- tradukado de fakartikoloj el nacilingvoj por proponi al e-fakbultenoj, -revuoj;
- prizorgado de diverscela korespondado inter e-istaj kaj ne-esp-istaj fakuloj;
- informado al ne-esp-istaj fakuloj pri fakaj seminarioj, konferencoj, kongresoj, kies laborlingvo estos (ankaŭ) e-o.

*Rim.: NENLAM nia celo estu esperantigado de la kontaktitaj homoj, kiuj mem interesiĝos pri e-o, se nia kunlaborado estos fruktodona.*

3. Instigi e-fakulojn al ĉeesto en internaciaj fak-konferencoj, -seminarioj, -kongresoj, eĉ se inter la laborlingvoj ne troviĝas e-o, kaj

- aktive partopreni en la laboroj, debatoj por pruvi sian fak-kompetentecon;
- neniel propagandi por e-o, sed nur uzi ĝin kun alilingvaj e-istoj dum paŭzoj, en la koridoroj, dum manĝoj, k.s.; ĝenerale tio sufiĉas por vekti intereson, al kiu ni respondu, sed NE per fanatika propagando, sed per racia, objektiva kaj mallonga (!) informado.
- organizi apartan kunvenon por la e-parolantoj (vespere, antaŭ kaj/aŭ post la konferenco) por pritrakti i.a. la uzotan strategion, fari bilancon, pretigi laborplanon, ktp.

*Rim.: kunordigu tian agadon estrarano aŭ (loka) komisiito de la koncerna e-fakasocio, se ĝi ekzistas.*

#### Avantaĝoj

1. Ne-esp-istaj fakuloj kontaktiĝos nature kun e-o, se fanatikuloj ne fiaskigas la agadon!

2. Sufiĉas havi nur kunordiganton, kiu nur prizorgu rilatojn inter la e-partoprenantoj; konferencejo, programo, loĝado, subvencio, ktp. estos zorgoj por la ne-e-organizantoj.

3. Laŭ la nombro, la seriozeco, la aktiva kunlaborado de la e-ĉeestantoj, ni povos peti, iom post iom, ke

- ankaŭ e-o fariĝu laborlingvo, eĉ parte, dum estonta kongreso;
- estu e-angulo en la bulteno/revuo de la asocio, ĉefe se en ĝi ekzistas rubrikoj (ekz. enhavtabelo, resumoj ktp.) en diversaj lingvoj.

### Realigu al Pasporta Servo!

Kara Gastiganto,

Kiel vi mem eble jam vidis en antaŭa versio de *Pasporta Servo*, oni uzis procento-simbolojn aŭ stelojn por indiki la gastigantojn kiuj ne re-aligiĝis al *Pasporta Servo* por la koncerna jaro. Sed, ĉar TEJO (kaj mi) volas havi liston kun nur fidindaj adresoj, ni decidis malaperigi tiujn simbolojn. Tio konkrete signifas, ke ni ne plu aperigos la adresojn, pri kiuj ni ne ricevis konfirmon pri la daŭra preteco akcepti gastojn laŭ la indikoj aperigitaj en *PASPORTA SERVO*.

Tial do ni petas vin laŭeble amase re-aligi. Multaj fruaj aliĝoj signifas, ke je la fino de la jaro ni ne devas tiom amase varbi por denove pleniĝi la libreton de *PASPORTA SERVO*. Krome mi petas vin, ke uzu la enmetitan (re-)aliĝilon por tiu celo, ĉar ĝi tre plifaciligas al mi la laboron (vidu la kolorajn paĝojn en la libreto).

Fakte tio signifas, ke vi povus jam tuj re-aligi al *PASPORTA SERVO* por ke viaj nomo kaj adreso aperu en la eldono 1993. Ni ne uzas la (iom koston) manieron sendi al ĉiu, kiu ankoraŭ ne re-aligiĝis memorigan poŝtkarton, sed ni komunikas tion pere de kelkaj gravaj esperanto-revuoj.

**Tiuj kiuj ne re-aligiĝis ĝis la limdato, efektive kaj tute aŭtomate ne aperos en Pasporta Servo 1993!!!**

Krome...

Bonvolu atenti la adreson de la kompilanto. Bv. uzi ĝin por ĉiuj demandoj rilate al *PASPORTA SERVO*. Ankaŭ varbilojn vi povas peti de mi. Nur (malgrandajn) mendojn direktu rekte al la adreso en Rotterdam aŭ al via kutima libroservo.

Bonvolu ankaŭ kontroli, ĉu viaj nomo kaj adreso estas tute ĝuste literumitaj en la libreto (mi petas vin speciale atenti la supersignajn literojn).

Ni petas, ke niaj ĉinaj gastigantoj uzu kroman paperfolion por skribi sur ĝin la ĉin-karakteran adreson, kiun ni volas aperigi en la nova listo.

Via kompilanto,

Rob KEETLAER,  
Postbus 2310, NL-1000 CH  
Amsterdam, Nederlando

*Rim.: ni estu tre singardaj en niaj petoj, des pli, ke por multaj fakoj, la terminologio en esperanto NE estas kompleta aŭ ĝisdatigita.*

#### Konkludo

En fakmedioj, la fina celo estu, ke e-o fariĝu laborlingvo samrajta kun alia(j) lingvo(j).

Germain Pirlot, Oostende, Belgio

*Rim. Ni estas konvinkitaj, ke iu ajn rezulto estas atingebla nur per profesinivela agado. Do estas*


### Borso de esperanto-manuskriptoj

invitas ĉiujn esperantistojn - posedantojn de iu ajn manuskripto en esperanto membriĝi al BEM kaj aboni la BEM-Bultenon!

Baza abonkotizo (per kiu vi fariĝas membro kaj rajtas ricevi 4 numerojn de BEM-Bulteno) estas: 16 guld. (10.000 liroj, 100 A.ŝil., 15 DM). Por ĉiu kompleta anonco pri unu manuskripto en la Bulteno vi pagas 35 guld. (32 DM, 225 A.ŝil., 23.000 liroj). Tio rajtigas vin havi kompletan anoncon laŭ la indikoj, kiujn vi donos en la anoncilo ĝis maksimume 100 vortoj en la Bulteno de BEM, kiun ni sendos al ĉiuj abonantoj kaj esperanto-eldonistoj tra la mondo. Ĝi ankaŭ rajtigas vin je titolmencio en anonco, kiun ni aperigos en Esperanto-Revuvo de UEA.

#### Eldonejoj, bibliotekoj, atentul!

Krome, ni invitos ĉiujn e-bibliotekojn kaj muzeojn havigi kopiojn de tiuj manuskriptoj, kaj organizaĵoj ĉiu-jare



1-2 foje Borsajn Renkontojn, en kiuj ni klopodos kontaktigi eldonistojn kun posedantoj de manuskriptoj vive. Ni klopodos ankaŭ iniciati diversajn projektojn, kie esperanto helpas interligi diversajn kulturojn kiel peralingvo.

**Kaŝitaj trezoroj eble ankaŭ ĉe vi...**

Eble vi havas hejme kolekton de viaj artikoloj, tradukon de iu novelo, leterojn de iu vivanta talenta amiko - kial pri tio neniu scias?

#### La sekva borso okazos la 12-13-an de decembro 1992. en Maribor.

Aligiĝilon kaj anoncilon petu de:

Ni havu, fine, superrigardon super la kaŝitaj trezoroj aperigindaj aŭ almenaŭ konservindaj en niaj publikaj bibliotekoj kaj arkivoj.

**La sekva borso okazos la 12-13-an de decembro 1992. en Maribor.**

Aligiĝilon kaj anoncilon petu de:

INTER-KULTURO, Zlatko Tišljar,  
Kočevarjeva 12, 62000 Maribor, Slovenio.  
Tel.: +38-62-221371.

*esence grave, ke ni lernu adaptiĝi al la metodoj de la "ekstera mondo". Tio aparte validas pri la ekstera aspekto de eventualaj korespondadoj. Ne forgesu, ke la ekstera aspekto de viaj leteroj donas la unuajn impresojn al la ricevonto.*

*Vi komencu iun agon, nur se vi mem estas preta fari ĝin ĝis la lasta punkto. Petu helpon de aliaj, sed konsci, ke promesita subteno - laŭ niaj ĉiutagaj spertoj - ankoraŭ ne signifas konkretan agon... Komencita, sed ne finfarita ago formas tre malbonan bildon pri ni.*

Szilvási László



## Lingvo

### Meditoj pri la propraj nomoj

Kiam dum interparolo oni devas komuniki ies personan nomon, oni devas ĝin elparoli. Do, oni devas scii kiamaniere la nomo sonas. Tial la nomo devas esti en la lingvo de la cetera teksto, kiun la leganto bone scias prononci. Do, se la libro estas en esperanto, ankaŭ la personajn nomojn oni devas legi en esperanto.

La nacilingva formo en krampoj ne estas nepre, simple ĉar ofte oni ne scias kiel ĝi estas skribata kaj elparolata nacilingve. Tamen se oni scias la nomon nacilingve, en krampoj ĝi devas esti prezentita (se eble) en nacia lingvo nur foje – ĉe ĝia unua trovo en la teksto.

Estas neserioze kaj tendence, ke oni ĉiam donas ekzemplojn de eŭropaj lingvoj latinalfabetaj. Se la nomo estas araba, ĉina, hebrea aŭ japana, ĉu oni devas scii ties alfabetojn (kaj posedi koncernan skribmaŝinon) por skribi ĝin nacilingve?

Neseriozaj estas ankaŭ la meditoj pri erara traduko de personaj nomoj en esperanton. Tion faras nur komencanto en iu ajn lingvo, sed neniu sciinto de la lingvo.

Mi foliumis plurajn romanojn de germanaj, francaj kaj anglaj aŭtoroj tradukitaj en la bulgaran kaj en la rusan lingvojn – nenie (eĉ interkrampe) mi legis la nomojn de la personaro en nacia lingvo. Kaj tio estas natura kaj ne embarasas la bulgaran (rusan) leganton. Krome, la historio ĝis nun ne konis okazon kiam aŭtoritata institucio aŭ apartaj personoj protestis, ke ekzemple en bulgarlingva traduko de alinacia verko ĉiuj personaj nomoj estis tradukitaj. Tial estas nekompreneble kial iuj nepre postulas, ke en verko tradukita en esperanto la personaj nomoj estu skribitaj en la lingvo de la originalo.

Estas nature kaj normale, ke esperantistoj bezonas kaj ŝatas havi je dispono esperantlingvaj nomojn, kaj oni devas klopodi iom post iom realigi tion kaj ne altrude bremsi la komunikadon per nacilingvaj, tute nekompreneblaj por la tuta esperantistaroj.

Neniu rajtas neglekti la fakton, ke esperanto estas tutmonda kaj ne eŭropa fenomeno, kvankam eĉ en Eŭropo ne ĉiuj devas scii kaj fakte ne scias ĉiujn lingvojn prononci kaj skribi la personajn nomojn nacilingve

Petko Arnaudov (BG)  
(laŭ Bulgara Esperantisto)

Mi (kiel ankaŭ cirile leganto, kvankam neslavo) devas konfesi, ke *min tre ĝenas legante en flua cirillitera teksto literaro vidable ne slavdevena, kies proksimuma prononco estas latinlitera vorto. En multaj kazoj nur post iom da tempo mi ekkomprenas la torditan, kelkfoje kripligitan vorton. Mi ne protestas, ĉar ene de unu alfabeto skribita teksto, tajpilo, ktp, mi ne postulus miksitaĵajn alfabetojn uzi samtempe, kiu same ĝenus la fluan legon. Mi ne protestas, sed mi ne dirus, ke min tio tute ne ĝenas.*

*Preni ekzemplojn nur la rusan kaj la bulgaran, kiel modelon de la internacia lingvomodelo estas same erare ol preni tiucele iun alian. Ĉerpi ideojn bone, sed modele sekvi unu?*

§H

EVENTOJ, esperanto nyelvű információs lap.  
Nyt. az.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-958 X.

A kiadó és a szerkesztőség címe:  
H-1675 Budapest, Pf. 87. Tel.: 1288258.  
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELLUR.

Készült az M & M nyomdában:  
H-1181 Budapest, Bercsényi u. 10.

EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.  
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio  
kaj LINGVO-Studio, Budapest.

Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.  
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

## Esperanto en radio

### Enketo de Radio Havano

La E-redakcio de Radio Havano, Kubo aranĝas enketadon inter la aŭskultantoj, por pli bone ekkoni ilian opinion pri la elsendoj, kaj ilian deziron koncerne la enhavon.

Jen demandoj de la enketo:

1. Je kioma horo (UTC) vi aŭskultas la e-elsendojn de Radio Havano el Kubo? (UTC = universala tempo, antaŭe ĝi estis konata kiel Greniĉa Meza tempo)
2. Bonvolu indiki la aŭd-kvaliton (metu X en la koncernan kvadraton)!  
bona/bona/nebona/malbon a/nula
3. El niaj programeroj elektu tri de vi preferataj  
» informoj pri la e-movado  
» kuba stampo  
» komentario  
» muziko  
» raporto  
» semajna radiojurnalo  
» intervjuo
4. Aliaj opinioj laŭ via bontrovo, eventuale sugestoj pri aliaj programeroj.

En via letero bv. indiki vian nomon, kompletan adreson, profesion, aĝon, sekson, kaj edukitecon.

Via letero estas atendata ĉe:

E-Redakcio de Radio Havano,  
red. Maritza Gutiérrez,  
pk. 6240, Havano, Kubo.

## Gajnu sonkasedon!

Vi povas senpage ricevadi informilojn de la *Pola Radio*, se vi tion petas en simpla letero!

Ĉiu nia alskribanto partoprenas en la lotumado de libro-premioj kaj sonkasedoj en e-to, kion ni faras unufoje en ĉiu monato! Bv. atenti, ke vi skribu vian adreson tre klare - per latinaj literoj!

*Pola Radio, Esperanto-redakcio*  
PL-00-950 Varsovio, pk. 46, Polio.

## Radio Vatikano

Radio Vatikano prezentis en sia lasta monatfina leterkesto, la 27-an de septembro la korespondan statistikon:

“La ricevitaj leteroj en septembro estis 72 el 20 landoj: Plejmulto (10 leteroj) venis el Italio, poste laŭvice Nederlando, Germanio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Vatikanurbo, Britio, Kroatio, Polio, Finnlando, Belgio, Hispanio, Nigero, Hungario, Latvio, Norvegio, Japanio, Rusio, Aŭstrio kaj

Svisio”. Ĉu en aliaj landoj ne ekzistas aŭskultantoj de Radio Vatikano?


Ekde la 1a de oktobro rondiĝos la ĵauda programo je 06.10 UTC (=07.10 laŭ Mez-Eŭropa Tempo), en la kurtondaj frekvencoj 6185 kHz (49 m) kaj 7365 kHz (41 m).

Pliajn detalojn, kaj program-priskribon vi povas ricevi senpage, sendante eĉ simplan poŝtkarton al: Radio Vatikano, Esperanto-Programo, Vatikanurbo.

Radioleo

## Unika eksperimento

Jam trian jaron ekzistas en ne granda urbo de Donecka regiono SĻAVJANSK la *Internacia Instituto de Administrado* (= manaĝado), kie lernas estontaj entreprenistoj, negocistoj, ekonomiistoj... Sed en ĝi estas multe farata por

UkrEA	ESPERANTO-	N14(22)
	CENTRO	1992
	INFORMAS	julio
Informilo de E-centro ĉe Internacia Instituto de Administrado 343206- SĻAVJANSK, ABON/KESTO 17		

esperanto. Estas eldonata tie du periodaĵoj: *E-Centro Informas*, (dufoje en monato po du-paĝa informilo kun freŝaj priesperantaj informoj), kaj la revuo “*Ukrainia Universitato pri Entreprenemo*”.

## Festivalo en Venezuelo

Inter la 12a kaj 15-a de decembro la Venezuelo Esperanto-Unuigo organizos la Nacian Esperanto-Festivalon. La organizanto petas la eksterlandajn esperantistojn, ke ili kunlaboru al la Festivalo per e-revuoj, libroj, afiŝoj, fotoj, ktp.

Bv. sendi la materialon al:

Venezuela E-Unuigo,  
David G. Valecillos V, Calle 79 N-ro 3C-72.

## Por plia jaro de kresko

8051 individuaj membroj en 113 landoj: tia estis la stato de UEA fine de la pasinta jaro. En la lastaj sep jaroj, la Asocio kreskis je pli ol 25%, atingante ankaŭ novajn landojn kaj landajn asociojn. La kresko mem estis mondekala: Brazilo, Finnlando, Francio, Korelo, Ruslando kaj Usono estis inter la pintaj landoj. Plivigliĝis ankaŭ la solidara donacado de kotizoj: 500 homoj en 1991.

*El Ligilo de Brazila Esperanto-Ligo,*  
jan/feb/mar. 1992.

## Anoncetoj

Okaze de la Zamenhofa festo de nia Esperantista Federacio de Laboro, bv. sendi salutkartojn el via lando ĝis la 6-a de decembro. Ni respondos al ĉiuj.

*La Travailleur Esperantiste, Gerard Requigny, Cité Franc-Moisin, bat.3 - Esc.10, F-93200 Saint Denis, Francio.*

**ŜAKISTOJ-ESPERANTISTOJ!** Aliĝu al EŜLI (Esperanta Ŝak-Ligo Internacia)! Vi havu kontaktojn kun alilandaj e-kolegoj! Vi povas partopreni en korespondaj ludoj kaj turneoj, kaj la kvaronjara bulteno "Esperanta Ŝako" staros ankaŭ je via dispono! Petu pliajn informojn, kaj aliĝu ĉe:

*Saulius Miliunas, str. Partizanu 154-1, LT-3041 Kaunas, Litovio.*

Studentoj de la gimnazio de Harkov lernas la anglan kaj francan lingvojn ekde ilia 6a jaraĝo. Eblas interŝanĝo de grupoj da lernejanoj kun la landoj angle- kaj france-parolantaj, ankaŭ pere de esperanto. Interesiĝantoj turnu sin al:

*Redakcio de Ukraina Universitato, pk. 17, UKR-343206 Slavjansk, Ukrainio.*

La kunvenoj de la Internacia Klubo "La Ondo de Esperanto" okazas ĉiuvendrede je 20.15 en Machiavelli str. 9, I-34132 Triesto. (telefono: +39-40-364746). Gastoj ĉiam bonvenas!

**PERBICIKLE TRA EŬROPO!** Duopo el Ukrainio intencas somere 1993. entrepreni longdistancon biciklan vojaĝon el Ukrainio tra Hungario, Aŭstrio, Italio kaj Francio al la 78-a UK en Valencio. Sen survoja helpo tiu vojaĝo povas esti malfacila. Ĉiuj interesitoj dezirantaj kunbicikli kaj ĉiuj pretaj helpi la vojaĝantojn (mapoj, tranoktoj ktp) estas petataj skribi al:

*Dmitrij Cibulevskij, pk 9307, UKR-310003 Harkov-3, Ukrainio.*

Ni serĉas eksterlandajn kunlaborantojn, precipe instruistojn en mez- kaj elementaj lernejoj. Ni tradukos el la ĉina lingvo diversnivelajn ekzamenajn demandojn pri matematiko, fiziko, kemio ktp, kaj la kunlaborantojn ni petas traduki ilin al sia nacia lingvo.

*S-ro Mu Bing, Chengdu Universitato, CN-610081 Chengdu, Sichuan, Ĉinio.*

Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista (IEKA) ekde aprilo 1992 havas en Ĉeĥoslovakio novan landan reprezentanton:

*Miroslav Severa, Lukostrelecká 2188, CS-470 01 Česká Lípa.*



Rok-Gazeto, F-31450 Donneville, Francio

## Korespondi deziras

En Oaxaca (Meksikio) tre aktivas la esperantista grupo, en kiu nun lernas ĉ. 200 gejunuloj. La gvidantoj kaj la instruistino de esperanto en la liceo serĉas adresojn de korespondemuloj junaj, kaj akcentas, ke la Oaxacaj gesamideanoj estas tre gastigemaj. Kontakto:

*Maria Godard de Castro (instruistino) sucursal C Apdo 4, Oaxaca 68050, Oaxaca, Meksikio.*

Nova esperantisto, 27-jara oficistino korespondus kun diverslandanoj pri turismo k literatura. Ŝi kolektas bildkartojn.

*F-ino Barbara Knas, Jacków 137, P-42-282 Kruszyna, Pollando.*

Ĉu vi estas junul(in)o inter la 12 kaj 17a aĝo? Ĉu vi serĉas korespondajn partnerojn? Skribu al la geknaba sekcio de la varsovia e-klubo, kie pluraj samaĝuloj atendas vian leteron. Skribu al:

*E-klubo Varsovia Vento, Katarzyna Mioduszewska, ul. Rembielinska 19/41, PL-03352 Warszawa, Polio.*

34-jara finna fraŭlo kun vasta intereso-listo (muziko, filatelo, pm, libroj, sporto ktp.) serĉas esperantistajn 15-18-jarajn knabinojn por ko-

respondi. Estus interese perletere konatiĝi! Tapari Lappalainen, Kyvalak otikyta, SF-37500 Lempäälä, Suomio-Finnlando.

26-jara civila inĝeniero, interesiĝas pri religio, literaturo, muziko, ktp.: Abraham Mrakpor, U.S.c/o Stephen O. Mrakpor, P.O.B. 1764 Warri, Bendel State, Nigerio.

27-jara esperantistino emas revivigi sian korespondadon: Edjoe Eve Sassou, B.P.52, Vogan, Togolando.

Pri ĉiuj temoj korespondus 15-jara knabo: Sebastian Tuszynski, P-87-100 Torun, str. Kosynierów Kosciuszk. 12.A,13, Pollando

Pri ĉiuj temoj korespondus mezaĝa virino: S-ino Urszula Adamska, Ciechocinek, str. Slonska 11, woj. Wlodelawskie, Pollando.

68-jara pensiulo, fraŭla, korespondus pri diversaj temoj tutmonde. Li interŝanĝus bildkartojn: S-ro Ladislav Královec, CS-345 32 Česká Kubice 77, Ĉeĥoslovakio.

35-jara ŝoforo korespondus pri ĉiuj temoj, kun ĉiuj landoj: Celestin Tovo, B.P.31, Aplahone (Mono), Benino.

27-jara diplomito pri filozofio kaj literaturo: Matindi Luntadila, B.P.7, Lukala (Bas-Zaire), Zairio.

## INTERNACIA KONKURSO POR LERNEJANOJ

En la numero aŭgusto (1)-92 de EVENTOJ aperis la alvoko kaj la regularo de la konkurso. Bv. denove tralegi ĝin! Pri la konkurso bv. averti viajn bazlernejajn kaj instruistajn konatojn!

### 1-a taskofolio por BAZLERNEJANOJ

1. *familio, hieraŭ, aŭtomato, fenestro, Eŭropo, morgaŭa* (3 poentoj)  
Substreku la akcentitajn silabojn!
2. *Li manĝis du ... kaj trinkis tason da...* (2 poentoj)  
Kompletigu la frazon per la vortoj: banano, teo!
3. *Faru almenaŭ ses vortojn el la vortradiko: amik-* (3 poentoj)
4. *Kvar plus du egalas ses* (2 poentoj)  
Ŝanĝu la kursivajn vortojn per samsencaj aliaj!
5. *Kion oni deziras al la familianoj antaŭ enlitiĝo?* (2 poentoj)
6. *Diru ĉiun per unu vorto:* (3 poentoj)  
komenci iri / fari ion verda / edzo kaj edzino
7. *Solve la enigmojn: pm / 2(ka)o / nki nki nki* (3 poentoj)
8. *Kiam naskiĝis K.Kalocsay, la fama hungara esperantista poeto?* (2 poentoj)

Kun la solvo(j) sendu poŝtmarkojn (en Hungario) aŭ respondkupanon (en transpagipovaj landoj) por la resendo de la korektita solvofolio kaj novaj taskofolioj, aŭ sendu nenion, se vi vivas en iu ekssocialisma lando.

**Lmdato** (poŝta stampo): 26a de oktobro.

La solvojn sendu al:

*Gimnazio Bányay Júlia, Esperanto-grupo Nyíri út 11. H-6000 Kecskemét, Hungario.*



## ROK-GAZETO aboneblas!

Por nepagipovaj landoj, la abono de Rok-Gazeto por 4 sinsekvaj numeroj kostas nur 13 USD aŭ 18 IRK (internaciaj poŝtaj respondkuponoj).

Se vi volas aboni tiun unikan eldonaĵon, aŭ

vi volas subteni ĝin, turnu vin al via landa e-asocio, kiu pagos rekte al ni pere de nia UEA-konto ROKK-B, aŭ al viaj korespondantoj en tranpagipovaj landoj. Se en via lando estas aĉetebla IRK (en ĉefaj poŝtoŝticejoj), vi povas sendi ilin rekte al ni:

*Eurokka, F-31450 Donneville, Francio.*

**MONATO** - internacia magazino pri ne-movadaĵ temoj,  
**EVENTOJ** - internacia gazeto pri la E-movadaĵ aferoj.